

50a Jaro

N ro 1

Januaro · Februaro 1958a

BELGA ESPERANTISTO



Oficiala dumonata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Redaktoro-Administranto :

la Prezidanto de R.B.L.E. :

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Fondita en 1908a



Abonprezo : Fr. 100,-

REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Prezidanto : S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44. Wilrijk.

Vicprezidanto-Kasisto : S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Vicprezidantino : S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.

Ĝenerala Sekretario : S-ro H. Sielens, "Internacia Marista Domo"

Falconrui, 21, Antverpeno.

(Poŝtĉeknumero : R. B. L. E. : 13.37.67)



Lesivejo - Memlesivejo MIA REVO

Tel. 361.86 - Poŝtĉekkonto 891.05

V. VERLEYE Oostendse steenweg 43, St Pieters-Brugge

la lesivejo "mia revo" prizorgas vian

lavaĵon kun la necesa kompetenteco, kaj tio estas por

via profito : pureco kaj malpli da eluziĝo.

KOMERCO DE FOTO-ARTIKLOJ & PAPERAJŬOJ

A. Denys Gentpoortstraat, 21 Brugge

ĈIO POR LA FOTOGRAFĴO

ARTIKLOJ POR FESTOJ - ŜERCPETOLAĴOJ

RABATO DE 10 % POR ESPERANTISTOJ

Feliĉan Novjaron

Nia 50-a Jaro

Kvankam nia revuo ne jam ekzistas dum plenaj 50 jaroj, ĝi tamen eniras, nunmomente, sian 50an vivo-jaron.

Kaj, — precize je tiu ĉi momento, — ĝi reprenas preskaŭ ekzakte la formaton, kiun ĝi havis je la apero de la unua numero kaj kiun ni ŝanĝis, nur antaŭ kelkaj jaroj, kiam ni iniciatis, kun tri aliaj Ligoj, eldonan kunlaboron, kiun nun la Nederlanda Ligo „L.E.E.N.” deziras ĉesigi.

Ni do estas devigataj daŭrigi sen ĝi, la entreprenitan laboron kaj preferas reveni al tiu ĉi formato, ne ĉar ni pensas ke ĝi pli multe plaĉos al ĉiuj ... Pri tio efektive neniam regos unuanimeco; sed ĝi, ekonomie, ŝajnas pli rekomendinda en la nuna momento.

Tiuj, kiuj antaŭ kvar jaroj, plendetis pro la ŝanĝo, estos nun kontentaj, ĉar ni revenas al iliaj preferoj... La aliaj estos kontentaj, ĉar dum kvar jaroj ni klopodis kontentigi ilin kaj, — nur iom devige, — revenas al la antaŭa eldonplano.

Sed ĉiuj kunlaboros por igi nian revuon pli interesa.

La nuna eldonmaniero permesos antaŭvidi, ke numero aperos en la mezo de ĉiu ne-para monato, minimume deksekspaga, ne enkalkulante la kovrilpaĝojn.

Sed, se la nombro de nia legantaro, t. e. de la membraro de nia Ligo, nur ankoraŭ iomete kreskos dum la ĵuskomenciĝinta jaro, ni povas jam, ekde nun, ne nur antaŭvidi, sed promesi, ke kelkaj numeroj povos igi pli dikaj, do pli riĉenhavaj.

Pri tiu ĉi riĉenhaveco, ne nur la direktantoj respondecas... Ankaŭ vi, la legantoj, povas helpi kaj ni kalkulas je ĉies kunlaboro en la estonto, kiel ni... — ofte vane... bedaŭrinde —, ... kalkulis pri ĝi en la estinteco.

Ni ne povas fini tiun ĉi artikolon, ne dezirinte al ĉiuj niaj legantoj, al ĉiuj la membroj de Reĝa Belga Ligo Esperantista, ĉion plej bonan por ili mem kaj por iliaj familioj, dum la jaro 1958a.

Tiu ĉi jaro estos, en nia lando, jaro de ĝojo kaj festoj, ĉar estos la jaro de la Univerala Ekspozicio en Bruselo.

Ni esperas ke, ankaŭ laŭ esperanta vidpunkto, ĝi estos por ni feliĉiga jaro, dum kiu ni havos okazon renkonti aŭ ekkoni multajn amikojn, kiuj batalas sur la sama kampo kaj por la sama idealo, kiel ni; kaj dum kiu la Movado mem ankaŭ povos akiri belajn sukcesojn.

Maur. Jaumotte.

RAPORTO PRI LA 42a UNIVERSALA KONGRESO 1957

En „Norvega Esperantisto”, ni trovis ĉi suban raporton pri la 42a Universala Kongreso en Marseille.

Ĝi ŝajnas al ni sufiĉe amuza, por ke ni represu ĝin entute. Oni povas eĉ kanti tiun ĉi raporton sur la melodio de „Au Clair de la Lune”.

Preskaŭ mi hazarde
iris al Marseille.
Suno brilis arde
al la kongresej
kaj la tuta urbo
dum la tuta tag’ :
Kapo kaj dorskurbo
ŝvitis dum la vag’.

Ĉiam mi sopiris
nur pri la botel’
dum mi ja deziris :
Estu ĝi barel’!
Estus ja ideo
ke okazu en
Mediterraneo
ĝeneralkunven’!

„Interkon”-vespere
en la Operdom’
inter benkoj vere
homon serĉis hom’.
Interkonatigis
ni kun benkoj nur!
Operbenkoj iĝis
tre efika mur’!

Festparol’ serena
dum la Inaŭgur’
de Ivo Lapenna,
reĝo de la jur’.
Ĉiuj admirante
rigardadis lin,
preskaŭ forgesante
rigardi ankaŭ min!

Oni aŭdis multon
en la I.S.U. :
Jen fraŭlino Boulton
kun videbla ĝu’
faris ja prelegon
pri la romantik’,
pardonu la mislegon :
temis : semantik’!

Komitato sidis
ĉiam en kunven’.
Ĉion ĝi decidis
kun grandega pen’.
Dudek kvin procentoj
interesas ĝin.
Eble tiaj rentoj
ĉagrenigas vin’?

Dum kongresa balo
en restoraci’
kvazaŭ arbohalo
dancis kun pasi’
reĝo I. Lapenna
ĉiam ja kun nur
ino plej konvena
por lia belstatur’.

Ŝaponjiĉ malsatis
preskaŭ ĝis la mort’,
kaj la viv’ lin batis
per terura sort’ :
ĉio kunportita
putris pro l’ sunbrul’.
Ploris konsternita
nia manĝegul’.

En la park’ regalis
la urbestro nin.
Ĉiuj ja batalis
por la franca vin’.
Al Canuto donis
urbmedalon li,
kio certe spronis
nin labori pli!

Grupo amatora
ludis Molière.
Vere tre kolora
estis la afer’.
Certe, amatora
estis la prezent’,
sed jam arto glora,
plena de talent’.

LA UNIVERSALA EKSPOZOCIO ... KAJ NI
LA UNIVERSALA EKSPOZOCIO ... KAJ NI
LA UNIVERSALA EKSPOZOCIO ... KAJ NI

Esperanto-tagoj dum la Ekspozicia periodo

Niaj legantoj jam scias, ke la Kongreso en Charleroi ne okazos dum 1958. Plej verŝajne B.C.K.E. (kiu grupigas ne nur Belgan kaj Flandran Ligojn sed ankaŭ aliajn esperanto-organizaĵojn en la lando) organizos, en la unuaj tagoj de junio, — kaj por anstataŭi la kutiman Pentekostan Kongreson, — Esperanto-tagon en Bruselo, kiu donos al ĉiuj okazon por unua vizito al la Ekspozicio, kies diversaj palacoj estos ĉiuj oficiale inaŭguritaj je tiu dato.

Aliflanke, la du Ligoj aliĝintaj al U.E.A. preskaŭ devige devos krei, — per la organizo de antaŭ- aŭ postkongreso al la Universala Kongreso de Mainz, — la eblecon por alirantaj aŭ rehejmiĝantaj kongresanoj, viziti nian Ekspozicion, ne nur individue kaj disc, sed en la kadro de ia Esperanto-aranĝo.

Antaŭ la Kongreso, tio estas la 1-a de aŭgusto, povus temi eble nur pri unu tago; post la kongreso, de la 10 ĝis la 12a, povus temi pri tri-taga aranĝo.

Pri tio, unuflanke, la estraro de B.C.K.E. kaj, aliflanke, la estraroj de F.L.E. kaj de R.B.L.E. decidis en la tuj venontaj tagoj, tiel ke, en la sekvonta numero, povos aperi jam detaloj pri ili.

* * *

La testoj aŭ ekzamenetoj de « Interpretistoj »

Dum la dua duono de la monato de februaro okazos en diversaj urboj la testoj por akiri la ateston de bonvolema interpretisto por la Universala Ekspozicio de Bruselo.

La estraroj decidis peti, ke ĉiuj, kiuj deziras akiri tiun ateston, indiku *almenaŭ OK tagojn*, dum kiuj ili restos absolute je la dispo de la prizorgantoj por gvidi esperantistojn. Tiuj 8 tagoj povos esti, ĉu 8 sinsekvantaj tagoj, do unu semajno de libertempo; ĉu 8 tagoj apartigitaj : ekz. 8 sabatoj aŭ 8 dimanĉoj difinitaj aŭ 4 semajn-finoj.

Tiel la organizontoj povos kunmeti tabelon pri deĵorado kaj, sen perdotempo, alvoki gvidontojn laŭbezono.

Ĉiu interesulo direktu sin al sia Grupo aŭ al sia Ligestraro por ekscii pri la ekzakta dato de la ekzameneto en sia urbo aŭ en loko proksima al sia loĝejo.

(Sekvo de la antaŭa pago)

Pri neologismoj
en l’ Akademi’
brilis paroksismoj
de parol-pasi’.
Venis eĉ kritik’ pri
Fundamenta vort’!
Certe ja kritiki
estas nobla sport’!

Zamenhof salutis
dum la ferm-kunsid’.
Poste ni balbutis
jam pri Ĝis revid’.
Ĉiam emocia
estas la disiĝ’.
Sed konsolo nia :
nova renkontiĝ’.

43a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Mainz — 2-9 Aŭgusto 1958

En tiu ĉi unua kajero de nia revuo ni volas resumi ĉion interesan aperintan en la tri unuaj komunikoj de la L.K.K.:

Aliĝo: Ĝis la 31a de marto, kongresano pagos DM.32, la edzino DM. 16, dum gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagos DM. 11.

Individuaj membroj de U.E.A. ĝuas rabaton de DM. 5 kaj iliaj edzinoj de DM. 2,50.

Post la 31a de marto la citataj ciferoj iĝos DM. 36, DM. 18 kaj DM. 12.

Ĉar, ĉe rekta sendo de mono al eksterlando, la Bankoj dekalkulas kostojn por proks. 5 %, kiujn la L.K.K. ja devas debiti en la konto de la aliĝintoj, ni sugestas ke oni pagu, rekte al sia grupa kasisto aŭ al la speciala por-kongresa kasistino de la Ligo, sumon en Belgaj Frankoj de Fr. 350 por individua membro de U.E.A. kaj Fr. 175 por lia edzino kaj ke oni aldonu sian aliĝilon.

La Liga servo tiam ĉion plenumos kaj la sumo entenas ĉiujn kromkostojn.

La P.Ĉ. No de S-ino J. Plyson, Bruselo (185, rue Jourdan) estas : 23.68.04.

Hoteloj: Po-tagaj prezoj por loĝado en Mainz, ĉio enkalkulita estas :

— en kategorio A : inter 7 kaj 10 markoj — en kategorio C : pli ol 16 markoj

— en kategorio B : inter 10 kaj 15 markoj — ĉe privatuloj : 6 markoj.

Studentaj loĝejoj: Loĝado en studentaj loĝejoj kun maksimume 3 litoj, kostos DM. 20 por la tuta semajno.

Ejoj: La poŝta adreso de la L.K.K. estas „43a Universala Kongreso de Esperanto — Mainz“; la poŝtĝiukonto : Ludwigshafen Nr. 3105; la telegram-adreso : Esperanto-Kongreso, Mainz; la Banko : Städtische Sparkasse, Mainz Nr. 2555.

La Kongresejo estos la „Palaco de la Elektataj Princoj,“ unu el la plej belaj ekzemploj de la germana renesanco, en situo fronte al la Rejno.

La Urbo Mainz akceptos la tutan kongresanaron en la kortego de la Kongresejo.

Belarta Konkurso: La Belarta Konkurso anoncas sian naŭan konkurson pri : Originala Poezio (maks. 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj); Tradukita Poezio : (maks. 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj); Originala prozo : (po proks. 12.000 literoj); Originala Drameto : (ludodaŭro maks. 25 min.)

Oni skribu, ĝis la 31a de marto, al la peranto S-ro G. C. Jervis, 343b, Birchfield Road, Redditch Wores, Britujo.

T.E.J.O.-kunveno: Antaŭkongrese okazos en Homburg/Sarfando, la 14a Internacia Junular-Kunveno de T.E.J.O., kun oficiala aprobo de la L.K.K.

Infana Kongreseto: Samtempe kun la U.K., okazos la 3a internacia infana Kongreso en la Feria Domo de Gonsenheim.

Registara Eldono: La Germana Registaro donacos al ĉiu kongresano centpaĝan oficialan libron en Esperanto pri Germanujo.

Glumarkoj: U.E.A. povas liveri kvarkoloran kongresan glumarkon je la prezo de DM. 1,— (aŭ 3 respondkuponoj) por tri folioj po 10 markoj.

Post la Jarfinaj Festoj

Ni ĵus travivis la jarfinajn festojn kaj en ĉiuj domoj oni ekaŭdis multajn kristnaskkantojn.

Inter tiuj ĉi unu estas plej fama :

Paca Nokt' — Sankta Nokt'

De ĝi aperis jam diversaj tradukaĵoj, inter kiuj la revuo « Dia Regno » citas la jenan :

Paca nokt', sankta nokt'!

Ĉio en dorm', sole nur
ne la kara, sanktega par';
ĉarma knabo kun bukla harar',
dormu en paca kviet'!

Paca nokt' sankta nokt'!
Anĝelhor' vekas nun
paŝtistaron solene per kant',
ĝoje gloras nun ĉiu aŭdant' :

Jen la savonto Jesu'!

Paca nokt', sankta nokt'!

Dia fil', kiel Vi

ĉarme ridas, montrante al ni,
ke la savo alvenis kun vi,
venis per via naskiĝ'.

Sekvas en la revuo noteto subskribita W. St. kaj kiu tekstas :

Ŝajnas ke ankaŭ en Esperantujo ĉi-tiu kristfestkanto estas tre ŝatata. Sed esplorinte la atingeblajn kantlibrojn esperantlingvaj, kaj traserĉinte ilin mi devis konstati, ke regas granda konfuzo rilate al ĉi-tiu kanto. Mi trovis ne malpli ol 5 diversajn tradukojn, kiuj pli malpli varias de la originalo.

Ĉi-tiu kanto ekz. estas originale germanlingva kaj devus esti esperantigita de samlingvano, kiu plej bone scias la delikatecojn de la poemo. Ĝuste ĝi estas pruvo por tiu aserto.

Laŭ mia opinio la plej bona traduko estas de F. Thiel, kies antaŭe menciitaj 3 strofoj esperantigitaj reesprimas plej bone la originalon de la verkisto, rilate kaj al la rimo kaj al la senco kaj al la sono. Ĝuste la lasta rilato ofte estas ne sufiĉe prientita; kaj krome la aliaj tradukoj entenas kelkajn erarojn. Kial do tiom vana laŭo-o! Ekzistas sufiĉe da tradukindaj aliaj kantoj, kiujn oni necese devus esperantigi. Se ekzistas kelkaj tradukoj oni almenaŭ devus interkonsentiĝi pri la plej bona. Volonte mi sciigos aliajn opiniojn.

Prospekto pri Mainz: La Urbo Mainz decidis eldoni prospekton pri la Kongresurbo en Esperanto, kiu estos dissendata al ĉiu kongresano.

Jubileo de U.E.A.: U.E.A. celebros en Mainz, dum speciala festa aranĝo, la 50-jaran Jubileon de sia fondiĝo, kiu okazis en 1908 fare de la svisa esperantisto S-ro Hodler.

Universala Ekspozicio: La universala Ekspozicio de Esperantaĵoj estos montrata en Mainz, dum la Universala Kongreso.

Prezidanto de L.K.K.: La ĉef-urbestro de Mainz, S-ro Franz Stein, bonvolis akcepti la prezidantecon de la Loka Kongresa Komitato.

„Memoro pri mia Onklo L. L. Zamenhof”

En Marseille, dum la Universala Kongreso, la ĉeestintoj ekkonatiĝis kun nepo de nia Majstro, kiu cetere havas la saman nomon kiel li, Ludoviko Zamenhof.

Tiu ĉi laŭŝajne estas la nura postrestanto el la familio de D-ro L. L. Zamenhof mem.

En „Revuo Orienta” aperis artikolo de D-ro M. Levita, kiu loĝas en Palestino kaj kiu estas nevo de nia Majstro, en ties edzina linio: li ja estas la filo de la fratino de Klara Silbernik.

En tiu ĉi artikolo la aŭtoro rapidege resumas diversajn epizodojn el la privata vivo de nia Majstro kaj estas en ĝi kelkaj detaloj ne jam cititaj kaj kiuj povas kontribui al pli bona kono de la familia vivo de D-ro Zamenhof.

Ni tial ne hezitas represi ĝin entute, fidante ke ĝi interesos niajn legantojn:

Mi memoras bone la unuan viziton de d-ro Zamenhof en la domo de miaj gepatroj en Varsovio dum la jaro 1887. Tiam en nia domo gastis mia onklino, la fratino de mia patrino, f-ino Klara Silbernik. Oni diris al mi, ke tiu sinjoro baldaŭ edziĝos kun mia onklino kaj estos mia onklo. Mi, estante tiam sesjara, rimarkis li havas malplenan kapon, ĉar jam tiam en la aĝo de 28 jaroj, li estis tute senhara. La edziĝa festo okazis en la salono Harmonja en Varsovio. La juna paro prenis loĝejon en la strato Dzika, kiu poste ricevis lian nomon. En tiu domo li komencis sian laboron kiel okulisto.

Mi tre ofte vizitadis ilian domon, kaj s-ino Zamenhof traktadis min kiel patrino. La antaŭĉambro de mia onklo estis ĉiam plena de malsanuloj, plej multe el inter la malriĉuloj. La liberan tempon li dediĉadis al Esperanto, tradukante la Biblion kaj la klasikajn verkojn de la tutmonda literaturo, kaj korespondante kun alilandanoj.

En Polujo mem li havis nur izolajn adeptojn, inter kiuj oni devas precipe menciigi Baudouin de Courtenay kiu estis naskita en tiu lando. Inter liaj alilandaj korespondantoj la plej famaj estis la filologo Max Müller, la ĥemiisto Wilhelm Ostwald, la matematikisto Couturat. Li korespondis kun dekaj da kluboj en diversaj landoj, kaj mi ĉiam ĝojis ricevi la poŝmarkojn. Dum sia laboro li multege fumis kaj promenadis en la ĉambro, murmurante kaj kantante popolajn melodiojn.

Lia patro Mark Fabianoviĉ Zamenhof estis unu el la tri judoj, kiuj estis allasitaj kiel gimnaziaj instruistoj. Sed liaj enspezoj estis sufiĉe malgrandaj, eĉ se li krome laboradis ankaŭ kiel cenzoro kaj aŭtoro de kelkaj libroj, lernolibroj de geografio, de la germana lingvo, kaj eldono de ruslingva biblia legolibro. La enspezoj estis pligrandigitaj per la pensio, kiun lia edzino mastrumis. Ŝi, la patrino de Lazaro, estis virino de esceptaj animaj kvalitoj, kiujn la filo plenmezure heredis.

Malgranda incidento okazigis multan ĉagrenon en la kariero de la patro. En unu numero de la „Berliner Tageblatt” aperis anonco pri iuj alkoholaj drinkaĵoj, dirante ke la plej fama aĉetanto de ili estas la tiama caro Aleksandro la Tria. La rusa registaro akuzis la cenzoron Zamenhof, ĉar li enlasis en Rusujon la anoncon, kiu ofendas la nomon de la caro. Minacis al li granda puno, kaj por savi lin lia filo Lazaro donis al li la sumon de 5000 rubloj, t. e. proksimume la tutan sian posedon. Finance ruinata, Lazaro kun la familio devis forlasi

Nia Membraro kaj la Premio „Antoinette Jennen”

Se ni rerigardas al la pasinta jaro kaj komparas la membro-nombrom dum 1957 kun tiu de 1956, ni konstatas ke R.B.L.E. povas esti kontenteta pri la akirita rezultato.

Por la tuta lando, la membraro plialtiĝis ĝis 105,94 % kaj, laŭ grupa vidpunkto, la rezultatoj estas jenaj: „La Verda Stelo”, Antverpeno: 106,2 %; Bruĝo: 93 %; Bruselo: 108,2 %; Charleroi: 440 %; Gento: 100 %; Lieĝo: 70 %; Verviers: 71,4 %; Izoluloj: 116 %.

Por la akiro de la Premio „Antoinette Jennen”, tamen ne temas nur pri la absoluta membro-plialtigo, sed pri poentoj akiritaj laŭ normoj, kiuj diferencigas la diversajn kategoriojn de membroj.

Kaj el tiuj ĉi komparaj ciferoj evidentiĝas, ke, por la jaro 1957, la Karloreĝa Esperanto-Grupo brile gajnis la premion, pro sia belega restarigo.

Jen la ciferoj:

Grupoj	p. en 1956	p. en 1957	Procentoj
Charleroi	24	97	404,1 %
Bruselo	347	393	113,2 %
Antverpeno	744	754	101,3 %
Gento	87	88	101,1 %
Lieĝo	60	45	75,0 %
Verviers	92	69	75,0 %
Izoluloj	40	43	107,5 %
Entute	1.812	1.869	103,1 %

(Sekvo de antaŭa paĝo)

Varsovion kaj transloĝiĝi al Grodno, kie ili tamen loĝis nur kelkajn jarojn. Intertempe la movado de Esperanto grandiĝis. Ankoraŭ antaŭ la Bulonja kongreso la familio revenis al Varsovio.

Dum lia vivo, Lazaro interesiĝis je multaj diversaj ideoj. Li partoprenis la ĵurnalon „Ruski Jevrej”, kie li publikigis hebre-naciajn artikolojn. Poste li proksimiĝis al Tolstojismo. Unu fojon li aperis en la famaj ĉiulundaj kunvenoj en la domo de Naŭum Sokolov. En tiu kunveno li paroladis pri humanistaj ideoj, kiujn li poste (1900) publikigis rus- kaj pollingve sub la pseŭdonimo «Homo Sum» en broŝuro „Hilelismo”.

Lastfoje mi parolis kun Lazaro Zamenhof je la fino de Novembro 1908. Jam tiam komencis ĉe li la arteriosklerozo. Pro tiu malsano li ne povis tiam akcepti mian peton ĉeesti mian edziĝfeston en Vilno en la unua de decembro 1908. Sed mia kara onklino Klara anstataŭis lin. Post la edziĝo mi transloĝiĝis kun mia edzino en Palestinon. Por la edziĝo-ceremonio mi survestis frakon, kiun li pruntedonis al mi. Memkomprene mi formetis de ĝi la insignon de la franca Legio de Honoro, kiun li ricevis de la Franca Registaro.

Komence de la milito 1914 mi ricevadis de mia onklino kaj de li multajn leterojn en Palestino.

Same kiel pure flandra kanto kiel „La Leono de Flandrujo” estas tradukita de Grabowski, same pure hispana kanto „Valencia” estas tradukita ... kaj adaptita de nederlanda samideano, pri kiu la revuo „Boletin”, kiu presigas ĝian tekston, diras ke li estas tie plaĉe konsiderata, kiel valenciano mem.

Ĉar ĉiu, ankaŭ en nia lando, konas la melodion de tiu ĉi prikantaĵo de la urbo, kiu estis, antaŭ nelonge, tiel kruele trafita per la sorto, ni volonte represigas, ĝin aprobante la surskribon de „Boletin”: „Per kanto ankaŭ oni povas omaĝi gajan urbon, kiam ĝi profunde malgajas... jen do la fama kanzono Valencia!”:

Valencia, kies tero sunkisita kuŝas ĉiam sub florar'
 Valencia, kies belaj la knabinoj plektas rozojn en harar'
 Valencia, kun aromo bonodora de l' oranĝoj, kvazaŭ or'...
 Valencia, kies palmoj susuradas pri la am' en nokta hor'.

La blankaj barakoj,
 La floroj de l' oranĝoj,
 La ĉielo turkiza...
 Helblua bel' de l' mar',
 Amata de la loĝantoj,
 Laŭdata per amantoj,
 En tuta mond', la amantoj
 Vin ŝatas sen kompar'!

Valencia, paradizo en la mondo, kun benita la klimat',
 Valencia, la edeno de la muzoj, de l' fekundo la legat'...
 Valencia, citadelo de l' scienco, de la arto kaj muzik',
 Valencia, trezorejo de folkloro, de la am' kaj romantik'.

Ĉe noktserenadoj
 Al dolĉa l' amatin'
 Ridadas la luno
 Ĉe bru' de l' tamburin'...
 Tremsonas kastanjetoj
 Ĉe danco pasia
 Allogas tualetoj...
 Vivu Valencia!

Valencia, kun Esperantista rondo, tutunika en la mond',
 Valencia, hele brilas Verda Stelo, kvazaŭ sun' ĉe l' horizont'...
 Valencia, citadelo de la gloro, de la paco kaj kultur'
 Valencia, Esperanta Trezorejo en ravega belnatur'...

Al vi enamiĝas ĉiu per tuta kor'!
 Vian gloron kantas tuta mond' en ĥor'!
 En sfero ekzotika,
 En sfero simpatika,
 En sfero ammistika...

VIVU VALENCIA!!!

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE. De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
 Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
 Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
 Ĝenerala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo”,
 Falconrui, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Funebro

Nia Liga Prezidanto, S-ro Maurice Jaumotte perdis en la monato de decembro, sian karan patrinon, kiu atingis la aĝon de preskaŭ naŭdek jaroj.

Ni prezentas al li, al S-ino M. Jaumotte kaj al G-roj Roger Jaumotte, niajn plej sincerajn kondolencojn, okaze de tiu ĉi funebro.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo”
 (Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 27an de septembro radiofona teatraĵo verkita de F-ino E. Van der Weken estis prezentata. Kunlaboris F-ino E. De Coene, S-roj L. De Marré, Fr. Schellekens kaj J. Verstraeten. S-ro J. Montmirail prizorgis la reĝion kaj sondekoron.

La 4an de oktobro S-ro Fr. Schellekens organizis parolatan ĵurnalon laŭ nova koncepto: Li uzis aron da aparatoj kaj akiris mirindan sukcesplenan rezulton, tiel ke la Prezidanto S-ro Maur. Jaumotte kore gratulis lin kaj samtempe alvokis al kunlaboro por similaj vesperoj estontaj. Vigla aplaŭdo sekvis.

La 11an S-ro Roger Jaumotte paroladis kaj montris lumbildojn pri „La homa Koro”. Li klarigis mirinde klare la diversajn funkciojn de tiu nobla organo kaj priparolis ĝiajn malsanojn kaj sekvojn. Pri la operacioj kaj la diversaj metodoj uzataj de la moderna ĥirurgio, li donis vere „metiajn” klarigojn, kiuj forte impresis la aŭdantaron, kiu dankeme kaj longe aplaudis je la fino.

La 28an, en ejo „Quinten Matsys” en la malnova kvartalo, la jara mitulvespermanĝo okazis. Grandnombre la membroj travivis kelkajn agrablajn horojn, manĝante la tradician antverpenan pladon.

La 25an, en la kadro de E.K.I., S-ro Henri Sielens paroladis kaj montris lumbildojn pri sia vojaĝo al Usono kaj aldonis amason da impresoj pri tiu granda lando kaj popolo. Lia kritika humorplena parolstilo plurfoje vekis la gajecon de la publiko

kaj la koraj vortoj de la E.K.I. Prezidanto M. Jaumotte estis plene aprobataj per granda aplaŭdo.

La 1an de novembro ne okazis kunveno kaj la 8an, dank' al la zorgoj de S-ro J. Montmirail, kvar dokumentaj filmoj estis prezentataj, inter kiuj unu esperante komentariita de S-ro J. Verstraeten. Kiel surprizo, la filmprezentanto montris filmon memverkitan en kiu pluraj bildoj pri la grupa ekskurso al Rupelmonde. F-ino A. Enzlin ankaŭ montris filmon memfaritan dum sia vojaĝo al la Norda Kapo en Norvegujo.

La 15an plia radiofona teatraĵo „La Diamantoj”, verkita de F-ino E. Van der Weken donis okazon al la geaktoroj montri sian talenton. Ĝin realigis F-inoj E. De Coene, M. Moniamé, Cl. Peeters; S-ino M. Vinck; S-roj R. Balleux, Fr. Schellekens kaj J. Vinck. S-ro J. Verstraeten enkondukis kaj flegis la reĝion. S-ro J. Montmirail, kiel kutime, plenzorge respondecis pri la sondekoraj aparataro.

La distra vespero, kiun S-ro Roger Jaumotte organizis la 22an, estis laŭ nova koncepto kaj akiris plej grandan sukceson. Estontece pluraj tiaj vesperoj estos organizataj.

La 29an S-ino R. Lecat paroladis kaj montris lumbildojn pri „Cambridge, ĝiaj Universitato kaj Kolegioj”. La parola-distino laŭ sperta maniero konigis al ni la tipajn kutimojn kaj morojn de la studenta angla junularo kaj ĉerpis multajn sciindaĵojn el la historia pasinteco de la fama urbo. Ŝi akiris plej merititan sukceson.

La 6an de decembro, okaze de la Sankta Nikolaa festo, S-ino L. Bernaerts helpita de F-ino E. Van der Weken, organizis tombalon por kiu la ĉeestantoj kunportis donacojn. La lotumado vekis ĝujan atmosferon kaj tiel estis facile al S-ro J. Verstraeten por plenigi la vesperon per amuza programo, kune dank' al la vigla kunlaboro de pluraj lernantoj de la nuna kurso.

La 13an, E.K.I. denove organizis Zamenhofan Vesperon, kiun enkondukis la Prez. S-ro Maur. Jaumotte per solena parolado. La diversaj antverpenaj grupoj mirinde kunlaboris al tre alloga kaj amuza programo kiu konsistis el skatoloj, dekla-

REPAGU TUJ VIAN KOTIZON

En la lasta numero de pasinta jaro, ni jam presigis la kotizojn por la diversaj kategorioj de membroj.

Ni petis pagi kiel eble plej baldaŭ tiujn kotizojn al la grupaj kasistoj aŭ, por la izolaj membroj, al la Liga kasisto, kaj ni havis la plezuron konstati ke multaj jam respondis al nia alvoko.

Ni refoje presigas ĉi sube la jam cititajn ciferojn, por ke tiuj, kiuj ne jam faris, povu, — sen pliaj serĉadoj, — ĝiri la ŝuldatan sumon.

Sub „Belga Kroniko”, ili trovas la P. C. Numerojn de la Liga kaj de la diversaj grupaj kasistoj.

Jen do la kotizotabelo :

Simpla membro	Fr. 100,—
Familia Membro	Fr. 50,—
Junulo-Simpla M.	Fr. 50,—
Kadeto-Simpla M.	Fr. 25,—
M. Abonanto UEA	Fr. 270,—
M. Jarlibro UEA	Fr. 185,—
Junulo-M. Ab. UEA	Fr. 135,—
Junulo-M. Jarl. UEA	Fr. 92,50
Membro Subtenanto	Fr. 400,—

Junulo estas membro 18-21 jara; kadeto, membro malpli ol 18 jara.

Ĉiuj tiuj ĉi kotizoj, — krom la Familia Membreco —, enhavas la abonon al „Belga Esperantisto”.

Sed tiu ĉi numero estas la lasta, kiun ricevos la pagintoj por 1957. La 2a numero de la nuna jaro estos sendata nur al la repagintoj por 1958.

maĵoj, kantoj kaj muzikaĵoj. Varma aplaŭdo kaj dankemaj vortoj de la Prezidanto konkludis tiun grandnombre ĉeestatan vesperon honore de nia kara Majstro D-ro Zamenhof.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw”, Frankrijklei, 4, je la 20,15 h. (1a etaĝo).

Januaro: la 3an: Parolata Ĵurnalo; la 10an: Amuza vespero (F-ino Bl. Geers); la 17an: Ĝenerala Ĵarkunsido; dimanĉon, la 19an: Jara Bankedo; la 24an: Parolado kun lumbildoj de S-ro W. De Smet; lundon, la 27an: Komenciĝo de ELEMENTA KURSO en Belg'leŝi, 99 je la 20a h.; la 31an: Solena Diplomdisdono.

Februaro: la 7an: Parolata Ĵurnalo organizota de S-ro Fr. Schellekens; la 14an: Amuza Vespere organizota de S-ro Roger Jaumotte; la 21an: Radiofona Teatraĵo; la 28an: Parolado kun sondekoru de S-ro Willy Deroisy pri „Jozef Haydn”.

Marto: la 7an: Parolata Ĵurnalo; la 14an: Distra vespero organizota de S-ro Roger Jaumotte; la 21an: Parolado kun lumbildoj de S-ro H. Sielens pri „Tri jaroj en la Marista Domo”; la 28an: Kabareta Vespere.

FAMILIA VIVO Funebroj

— La Grupo perdis unu el siaj fidelaj membrinoj, S-ino R. Van de Cauter, multe pli bone konata de la Antverpenanoj ĝenerale, laŭ sia artistina nomo: S-ino Christiane.

Estis unu el la plej belaj kaj bonaj kantistinoj, kiu ludis ĉiujn gravajn rolojn en la iama Franca Operejo de Antverpeno, en tiu de Gento, en diversaj francaj kaj precipe en la Reĝa Flandra Operejo de Antverpeno.

Al ŝiaj gefamilianoj kaj al niaj ĝeamikoj G-roj G. De Backer, ŝiaj kunlaborintoj, niajn plej sincerajn kondolencojn.

— Plej kruele trafitaj estas, aliflanke, niaj karaj ĝeamikoj, la junaj Ĝesinoroj H. Jacques-De Ketelaere, kiuj perdis, en vere tragikaj cirkonstancoj, sian fileton Steven, apenaŭ trimonatan.

Al ili iras niaj sinceraj kunsentoj, same kiel al S-ro M. De Ketelaere, la avo, kaj al la ĝeankloj, ankaŭ ĝemembroj.

Naskiĝo

La naskiĝo de la eta Kurt-Johan, en la hejmo de G-roj Walter Van Nereaux-

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

Amerycx, estas okazo por ni gratuli dekon de niaj plej bonaj ĝemembroj: Walter kaj Jeanne-ken, la feliĉaj gepatroj; G-roj J. Van Nereaux kaj G-roj K. Amerycx, la ĝeavoj; Joseph kaj Mimi Vinck-Amerycx, ĝeankloj, kaj ankaŭ la du pli junaj onkloj, same membroj de nia Grupo, Carlo kaj Florent.

Dek, — kaj por la nuna jaro 11 ĝemembroj —, en unu familia rondo ... gratulinda rekordo!

..

Du pliaj naskiĉoj feliĝigis ĝemembrajn familiojn: G-rojn P. Thaeŝ, kies fileto nun, same kiel la edzino, bone fartas, kaj G-rojn A. Debacker, kie filino S-ino Sette, naskis filineton Hilde.

Al la feliĉaj ĝeavoj kaj al la du gepatroj paroj, korajn gratulojn kaj bondezirojn.

BRUĜO

Bruĝa Grupo Esperantista
(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La lecionoj de la elementa kurso estis regule sekvataj dum la unua horo de ĉiu kunveno. La dua horo de tiuj kunvenoj estis aĝrabligata per la sekvantaj programoj:

La 1an de oktobro, la ĉeestantoj ĝuis tre interesan paroladon de S-ino S. Verbeke-Vandenberghe pri la temo „Pentrista vojaĝo tra suda Francujo.” Multaj belegaj lumbildoj estis montrataj per aparato afable pruntedonita de S-ro R. De Buysere.

Lastaj aranĝoj por la grupa balo estis aprenataj la 8an de oktobro, post kio F-ino Yvonne Poupeye paroladis pri la vivo kaj la verkaro de du famaj muzikistoj: Felix Mendelsohn kaj Max Bruch. Du tipaj verkoj de tiuj komponistoj estis ludataj per la diskaŭdigilo.

La unua grupa balo de la sezono okazis sabaton 12an de oktobro, en la salonego „Concordia”. Pro la ĵus furiozanta grip-epidemia, la laŭnombra sukceso ne estis

tiel granda kiel kutime, sed tamen la ĉeestantoj bonege amuziĝis. Pri tiu balo estis raportata dum la kunveno de la 15a.

La 22an S-ro, R. Behaeghel, helpa sekretario kaj bibliotekisto, faris paroladeton por altiri la atenton de la ĝemembroj pri legado de libroj el la grupa biblioteko. Tiu biblioteko estis detale prezentata al la ĉeestantoj, kiuj prunteprenis kelkajn librojn.

La 29an, en la kadro de la parolata gazeto, S-ro R. Behaeghel prezentis interesan artikolon pri la neceso de Esperanto inter la ĵurnalistoj kaj F-ino L. Vermeersch rakontis humorajojn.

Kanta vespero okazis la 5an de novembro; du kantoj estis unue legataj kaj poste kantataj kun pianoakompanado de S-ino Poupeye.

Portretludado kaj plia kantado aĝrabligis la kunvenon de la 12a. Dum tiu de la 19a, „Belga Esperantisto” estis publike legata kaj klarigata.

Plia numero de la parolata gazeto aperis la 26an, kun interesaj kontribuoj de F-ino L. Vermeersch pri „Persono kiu plenumis sian promeson” kaj de S-ro Marcel Poupeye pri „Ĉu la hundino Laika estas la unua fluganta besto?”

Surpriza vespero okazis la 3an de decembro. La multnombraj ĉeestantoj estis alportintaj ĉiuj nekonatan premion. Tiuj donacetoj plej diversaj estis dislotataj kaj estigis grandan plezuron dum sia elvolvado.

Konkurso pri miksitaj temoj interese okupis la ĉeestantojn, dividitajn en du grupojn, dum la kunveno de la 10-a.

Fine, la 17an de decembro estis donata la lasta leciono de la elementa kurso. La ĝvidinto, S-ro Ch. Poupeye, gratulis la persistemajn lernintojn kaj invitis ilin al aktiva kunlaboro en la grupa vivo. Post tio li dediĉis kelkajn vortojn al la rememoro de la naskiĝotago de D-ro Zamenhof kaj legis parton ankoraŭ ĉiam aktualan el kongresa parolado de la Majstro.

Programo de la venontaj kunsidoj

1-e) ĉiulunde, je la 8a vespere, en la komunuma lernejo de Sint-Michiels, leciono de la perfektiga kurso sub ĝvidado de S-ro R. Behaeghel. Ĉiuj grupanoj estas invitataj kaj estos bonvenintaj.

2-e) ĉiumarde, en la grupa sidejo „Gouden Hoorn - Cornet d'Or” Simon Stevinplaats, 2; Tel. 314.59: je la 8a vespere.

Januaro: la 7an: Festeto de la tri Reĝoj; la 14an: Ĝenerala Ĵarkunveno; raportoj, elekto de la komitato, petoj kaj proponoj, ktp.; Ek de la 21a de januaro: ĉiumarde je la 8a vespere: perfektiga

ANTAŬ KVINDEK JAROJ...

Novaj(et)oj ĉerpitaj el la tiutempaj gazetoj

Laŭ privata letero de S-ro Schibbye, la reĝo de Novegujo montris favoran intereson al Esperanto kaj dum aŭdienco longtempe interparoladis kun nia samideano pri la helpa lingvo.

S-ro Em. Gasse entreprenis la tradukon de la bela verko de Ernest Renan: „Vivo de Jesuo” kaj riĉigis la Esperantan literaturon per tre bona kaj tre preciza traduko.

La Almanako Hachette-Lebègue enhavas, en sia literatura fako, artikolon pri „La Progreso de Esperanto”. Tiu almanako estas tre disvastigita kaj ĝia propagando estos certe tre fruktodona.

Pri la elekto de Esperantista Festo-tago, la tria Kongreso de Esperanto estas elektinta komitaton de ses membroj por proponi daton por la tutmonda festotago. Nia Majstro proponas:

a) la tagon de 17a de decembro (dato de la unua festo esperantista en la jaro 1878);

b) la tagon de la printempa (por la suda hemisfero: aŭtuna) tagnokt-egaleco, kiu povas servi kiel simbolo al la neŭtraleco de la tuta homaro.

S-ro Gustave Roy, profesoro de la Kolegio de St. Girons (Ariège, Francujo) projektas fondon de neŭtra Esperanto-lando en la neŭtra urbeto Moresnet, ĉe la limo germana-belga.

Informo alvenis pri la fondo de la unua grupo en Portugalio, kies adreso estas: Porta Grupo Esperantista, Larho do Laranjal, Porto.

Pola ĵurnalo por kuracistoj „Glosu Lekarzy” komencos de marto 1908 esperantan fakon por internacia korespondado de kuracistoj kaj invitas ĉiujn samide anajn kuracistojn partopreni tiun rubrikon.

leciono, al kiu ĉiuj grupanoj estas invitataj. Post tio, je la 9a vespere: la 21an: Legado de B.E.; la 28an: Parolata gazeto.

Februaro: la 4an: Kartludado; la 11an: Muzika vespero kun komentario; Sabaton 15an de februaro, je la 9a vespere, en la salonego „Concordia” Dua vintra balo. Anoj kaj amikoj de la grupo de nun rezervu tiun daton. Mardon la 18an: (denove en la sidejo): Konkursludoj: S-ro R. Behaeghel; la 25an: Parolado de S-ro Ch. Poupeye pri „Belgaj Tribunaloj”.

BRUSELO

Reĝa Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero: 12.30.48)

La 23an okazis solena vespero, kiun ĉestis S-ro M. Jaumotte, la Liga Prezidanto kaj D-ro Kempeneers, honora prezidanto de la Grupo, kaj dum kiu S-ro Jaumotte, kun trafikaj gratulvortoj, pinglis sur la bruston de du jubileantinoj de 25 jaroj, S-ino J. Plyson kaj F-ino M. Kestens, la honoran medalon de la Ligo.

S-ino E. Staes transdonis al ambaŭ belajn florojn, dum la ĉestantoj varme aplaŭdis.

Sekvis tiam vere eksterordinara prelego de S-ro M. Jaumotte, pri lia vojaĝo en Hispanujo. Enkonduke, li substrekis kiom malfacile estas objektivite prijuĝi fremdajn landojn kaj popolojn, ĉar oni ilin rigardas tra propraj naciemaj okulvitroj. Sed S-ro Jaumotte vojaĝas kun larĝe malfermitaj okuloj kaj spirito. Liaj klarigoj pruvis lian grandan klarecon kaj akran observkapablon. Kun la helpo de S-ino M. Weyn kaj de F-ino R. Huysmans, kiuj lerte manipulis la projekci-aparaton, li montris sennombrajn superbelajn lumbildojn (ŝajne estis 170!) kiuj preterpasis antaŭ ĉies admiranta okuloj. Kaj, dum du horoj, la elokventa prezidanto ilin nelacigeble kaj seninterrompe komentariis.

Necble estas, per resumaj vortoj, pri-kribi la perfektecon kun kiu paroladas tiu potenco oratoro. Li plene sugestas sian entuziasmon al sia publiko, kiu senspire aŭskultas, ne konsciante pri la forfluganta

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

tempo. Fervoraj kaj longaj aplaŭdoj salutis tiun impresan, neforgeseblan prelegon. La Prezidanto, S-ro R. Jacobs, afable dankis la talentplenan preleginton.

La 30an, okazis bela filmoprezentado, dum kiu, dank'al aparato pruntedonita de S-ro Piron, S-ino M. Weyn montris multnombrajn, riĉenhavajn, kolorajn filmojn, kiujn ŝi lerte klarigis. Multaj aspektoj de la Kongolanda vivo, la vizito de Reĝo Baŭduino, la kontakto inter belgoj kaj nigrujoj estis pritraktataj.

Entuziasmaj aplaŭdoj dankis la du meritplenajn iniciatintojn kaj organizintojn de tiu ĉi vespero.

La 7an de oktobro, S-ro Jacobs disdonis, kun gratulaj vortoj, diplomon kaj ĉekon al du laŭreatoj de la jaro 1956-57, nome; al S-ro H. Castel, gajninto de la parolata ĵurnalo, kun 207 poentoj, kaj al S-ro Jirousek, plej regula ĉestanto de la kunvenoj. Poste S-ro Castel laŭtlegis kelkajn el siaj plej interesaj kontribuajoj kaj S-ro Wuyts legis amuzan historion pri „Servistinoj”.

La 14an, S-ino Lecat daŭrigis kaj finis sian paroladon pri Einstein, kies starpunkton je la persekutoj kontraŭ judoj ŝi klarigis, same kiel lian kontraŭstaron al ĉiuj diktatoraj reĝimoj kaj al ĉiuj potencoj financaj kaj aliaj, kiuj malhelpas la liberan pensadon.

Post tiu ĉi elstara parolado, kelkaj membroj faris demandojn, al kiuj la prelegantino plej volonte respondis.

S-ino Lecat ankoraŭ legis memverkitan rakonton, psikologian kaj humorplenan, kaj ŝi akiris la dankeman aplaŭdon de ĉiuj aŭskultintoj.

La 21an, S-ro D. van der Stempel dum sia perfektiga kurso, pritraktis la prepoziciojn kaj inaŭguris konversacian ekzercon pri „Bruselo 1958”, antaŭvide al la Ekspozicio.

La 28an, ĉestis la kunsidon bulgara samideano S-ro Ivan Zekof, kiu loĝas en

Bruselo. F-ino R. Huysmans laŭtlegis humorplenan verketon pri la „Historio de la Kiso”; post kio S-ro H. Castel relegis artikoleton pri kisado de ruĝigitaj lipoj. Sekvis amuzaj interparoladoj kaj rakontoj pri tiu ĉi gaja temo.

La 4an de novembro, estis memorigata la datreveno de la fondiĝo de UNESKO. S-ro Castel rakontis kaj legis pri ĝiaj historio, celo, organizado, labormaniero, agado, atingitaj rezultoj kaj ĝiaj interrilatoj kun U.E.A.

Sekvis la parolata ĵurnalo kies gajnintoj estis S-ro Schumacher, kun memverkita teksto „Aktualaĵoj”, kaj S-ino Doolage, por legita teksto „Letero”.

La 18an, la perfektiga kurso de S-ro D. van der Stempel pritraktis i.a. la adverbigojn de la prepozicio. Sekvis dua konversacio pri „Bruselo 1958”.

Programo de la venontaj kunsidoj

Ĉiulunde, je la 20a h., en „Brasserie de la Justice”, 38, place du Grand Sablon, Bruselo, la; Tel. 12.64.76.

Januaro: La 6an: Parolata ĵurnalo; la 13an: Parolado de S-ino Ernst: „Tri amuzaj historioj”; la 20an: Perfektiga kurso de S-ro D. van der Stempel; la 27an: Generala Jarkunsido.

Februaro: La 3an: Parolata ĵurnalo; la 10an: Parolado de S-ino Staes: „Unu tagon en Damme”; la 17an: „Korba” sur prizvespe-ro; la 24an: Perfektiga kurso de S-ro D. van der Stempel.

Marto: La 3an: Parolata ĵurnalo; la 10an: „Parolado de S-ro Swinne” „Einstein kaj Liberekonomio”; la 17an: Perfektiga kurso de S-ro D. van der Stempel; la 24an: Amuza vespero, de S-ino Weyn; la 31an: Debatvespero.

CHARLEROI

Karlreĝa Esperanto-Grupo

Ĉiumarde okazis la kurso, kiun partoprenas regule diligentaj lernantoj, firma kerno por la Grupo.

La 4an de oktobro okazis la lasta kunveno de la L.K.K. starigita kun la celo organizi Beneluxan Kongreson en Charleroi dum 1958. Tiu projekto estas forlasita pro la antaŭvidataj malfacilaĵoj, note pri la loĝado. La L.K.K. disiĝis.

La 10an de oktobro S-ro Jaumotte, Prezidanto de R.B.L.E., faris propagandan prelegon pri Esperanto en la hotelo „Le Residence” en Charleroi. La Prezidanto entuziasmigis ĉiujn aŭskultantojn per sia agrabla kaj interesa parolado. La vespero finiĝis en la cjo de la Grupo en tre amika medio. La Grupo dankas sian Prezidanton

Rui Barbosa: Homo kontraŭ maljusteco

Antaŭ kvindek jaroj okazis en Hago, dum 1907, la dua Paĉkonferenco. La ĉefa temo de tiu konferenco estis la demando pri deviga arbitracio inter ŝtatoj okaze de konflikto, kaj estis proponite, ke tion ebligu la kreado de permanenta arbitracia kortumo. Kiel formi tiun kortumon? La deziro de la kunveno estis klara: necesis nur konfirmo de agadprincipo jam evidenta — regado de la mondo pere de la grandaj ŝtatoj. La kortumo kaj la arbitracio, sekve, estos tereno nur de la potencaj ŝtatoj.

Tiam malgranda, fizike malfortaspekta, viro kun granda kapo super malfortika korpo, delegito de Brazilo, elstaris kaj diris: „Ne!” Antaŭ la fortaj ŝtatoj li pledis por la malfortaj. Li estis advokato por la malgrandaj nacioj de Eŭropo kaj la novaj ŝtatoj de Suda Ameriko. Rui Barbosa kaŭzis varmegan debaton, sed baldaŭ oni konstatis, ke li estas la elstara personeco de la konferenco. Tiu konferenco rezultigis malmultajn tujajn praktikajn sekvojn, sed almenaŭ la jura egaleco de ĉiuj ŝtatoj, ĉu

por lia prelego, kiu ebligis al ĝi la varbadon de tri novaj membroj.

La 17an de decembro, anstataŭ la kutima kurso, okazis speciala kunveno, kiun ĉeestis la membroj kaj kelkaj invititoj. S-ro de Cuyper prelegis pri „La Kastoroj”. Sperta kompetentulo pri tiu ĉi temo, li parolis pri siaj esploradoj, montris multajn fotografajojn pri tiuj bestoj kaj iliaj konstruoj, kaj ankaŭ kelkajn „lignaĵoj(n) de kastoroj”.

Tiu prelego plaĉis al ĉiuj kaj konsekvence oni decidis ke, ĉiumonate, okazos tia vespero.

Dum proksima januaro, S-ro L. Bray komentarios kaj aŭdigos per sonstrioaparato prelegon pri orienta kuracado.

Dum februaro, S-ro de Cuyper, pro la sukceso de sia jam farita prelego pri Orientaj Landoj, reparolos pri tiu temo.

Dum marto, S-ro G. Parmentier parolos pri la vitrofarado. Kaj en aprilo Charleroi festos sian „Oran Jubileon”.

novaj aŭ malnovaj, ĉu riĉaj aŭ malriĉaj, estis rekonita.

Rui Barbosa, la viro kiu akiris tiun venkon per sole sia obstina volo kaj sia vigla intelekto, estis kutimiĝinta al pledado por justeco kaj respekto al la leĝo. Antaŭ kelkaj jaroj lia biografio, verkita de Fernando Nery, estis eldonita ankaŭ en Esperanta traduko.

Universala poŝta unuiĝo pritraktas al poŝtajn servojn de la mondo

Sendi leteron aŭ ĵurnalon al amiko ĉe la alia flanko de la terglobo estas afero simpla, ĉiutaga. Tiel simpla ĝi estas, efektive, ke malmultaj pripensas, ke necesis multaj jarcentoj ĝis la poŝtaj servoj atingis sian nunan fidindecon kaj kompetentecon, kaj kreskis al la vasta kaj kompleksa sistemo, kiu nun traarkas la mondon.


Por certigi la senĝenan fluadon de la poŝtaj komunikadoj, 300 delegitoj el 96 landoj kunvenis en Ottawa, Kanado, de aŭgusto ĝis oktobro 1957, por la 14a Universala Poŝta Kongreso.

Estis la Universala Poŝta Unuiĝo, kiu sisteme rekonis Esperanton kiel klaran lingvon en la kadro de poŝtaj kaj telegrafaj komunikadoj.

Biologiaj aspektoj de kancero

D-ro Julian Hexley, antaŭa Ĝenerala Direktoro de Unesco, ĵus eldonis gravan libron pri studo de „biologiaj aspektoj de kancero”. Tiu verko, tute scienca tamen ne seninteresa por vasta publiko, enhavas sennombrajn strangajn kaj neatenditajn eltrovojn: 80% de maljunaj ĉevaloj mortas pro tumoroj; iaj interbredaĵoj de bestoj kaj plantoj produktas nur kancerhavajn hibridojn; la elblovitaj gasoj de Dieselmotoroj kaŭzas tumorojn inter agarikoj; unu el la kancerroj plej oftaj en sudorienta Azio estas trovata inter personoj, kiuj fumas cigarojn kun la bruligita fino en la buŝo.

Jen la unua fojo, kiam verkisto pri tiu temo klopodis kolekti ĉiujn konatajn faktojn pri kancero. La libro de Prof. Hexley montras, ke la studado pri kancero ne plu estas nur fako de la medicino, sed ke ĝi estas kampo de ĝenerala biologia esplorado.



LASTMOMENTA NOVAĴO

Ni ĵus ekscias ke la L.K.K. de la Universala Kongreso en Mainz, decidis ke unu el du antaŭviditaj postkongresaj vojaĝoj celos Bruselon kaj ĝian Ekspozicion.

Tiu vojaĝo, antaŭvidita do oficiale de la L.K.K., daŭros tri tagojn.

...Kaj ni do ja certe devos prizorgi la bonan akcepton de tiuj vizitantoj!

Bibliografio de scienca literaturo Esperanta et Japanujo

Tokio, oktobro, (IGS/193). Aperis, Bibliografio de Scienca Literaturo Esperanta en Japanujo”, kiu listigas 156 originalajn verkojn kaj 17 raportojn (1926/1942) de la Aerologia Observatorio de Tateno. Koncerne tiujn lastajn sciencajn raportojn en Esperanto, oni devas rimarki ke la plej mallonga ŝajnas tiu de 1931 kun 142 paĝoj. La Bibliografio citas krome 81 resumojn, 12 tradukojn kaj 15 terminarojn kaj artikolojn pri nomenklaturo, plus angla-japana-esperantan terminaron de elektrotekniko kaj kelkdekojn da verkoj neklasifikitaj.

La XIII kongreso de la modernaj lernejoj rekomendas Esperanton

Parizo, oktobro, (IGS/194). Dum sia ferma kunsido la 13-a Kongreso de la Modernaj Lernejoj, okazinta en Nantes (Francujo), akceptis rezolucion en kiu — post agnosko de la kreskanta graveco de la interlernejaj interŝanĝoj kaj de la koncernaj lingvo-malfacilaĵoj — ĝi petas al la Ministro por Nacia Edukado la enkondukon de fakultativa lernado de Esperanto en la lernejajn programojn. La rezolucio rekonas

ankaŭ la disvastigon de la Internacia Lingvo kaj ĝian strukturan simplecon. Antaŭ nelonge la 6-a Amerika Kongreso de Edukistoj rekomendis al ĉiuj instruistoj kaj profesoroj la lernadon de Esperanto.

Ĉu la franca lingvo forigota de la Nederlandaj lernejoj?

Hago, oktobro, (IGS/198). Granda bruo vekas en Nederlando la propono de la nacia komitato por la „Malŝarĝigo de la lernejaj programoj”, starigita antaŭ kelkaj jaroj de la Ministro Rutten, ke la franca lingvo — kiu nun estas devige instruata — fariĝu fakultativa. La Unuiĝo por la Progresigo de la Franca Lingvo tuj iniciatis energian proteston. La lingvo, kiun la nederlandanoj preferas lerni, estas la germana, kiu estas multe pli simila al la nederlanda ol la angla. En la tuta lando estas pli kaj pli disvastigata la Internacia Lingvo Esperanto.

Eldoniĝis scienca kaj teknika terminaro en Esperanto

Tokio, novembro, (IGS/210). Laŭ komisiio de Internacia Scienca Asocio Esperantista, aperis en Esperanto, en eleganta 248 paĝa eldono „Scienca kaj Teknika Terminaro”, verkita de inĝ. Rudolf Haferkorn kaj D-ro Kurt Dellian en kunlaboro kun Prof. F. J. Belifante kaj multaj aliaj sciencistoj, inter kiuj la japana rektoro d-ro S. Nishi. La verko listigas la terminologion de 83 fakoj inter kiuj atoma fiziko, filozofio, geodezio, kirurgio, paleontologio, k.t.p. Post la difino, la vortoj estas laŭbezono nomataj en angla kaj germana aŭ latina.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE S. P. R. L. Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

Italujo dediĉas sian unuan straton al la internacia lingvo

Romo, novembro (IGS/211). Laŭ unu-anima decido de la urbestro, inaŭguriĝis en Pisticci (itala urbo en provinco de Matera) strato kun nomo „Esperanto”. Kvankam en Milano kaj Bologna troviĝas stratoj dediĉitaj al la kreinto de Esperanto, d-ro L. L. Zamenhof, tiu de Pisticci estas la unua strato en Italujo kiu rekte honoras la Internacian Lingvon. Ekzistas en la mondo ĉ. 80 stratoj kaj placoj kun la nomo de Esperanto aŭ de ĝia kreinto.

La lingvo-diferencoj kaj la kostoj en Svisujo

Berno, novembro, (IGS/213). La verko eldonita de UNESKO, „La presse filmée dans le monde” (La filmgazetaro en la mondo), raportas pri plia epizodo rilate al la financaj konsekvencoj de la lingvo-diversigo. Laŭ la citita verko, la svisa filmgazeto „Ciné-Journal Suisse” devas esti eldonata en tri lingvoj, franca, germana kaj itala. Tio kaŭzas tre altajn elspezojn, ĉefe pro la postulata rapideco kaj perfekteco de la laboro. La rezulto estas, ke la kosto de „Ciné-Journal Suisse” ampleksas 400.000 svisajn frankojn kaj ĝiaj enspezoj apenaŭ atingas 130.000 frankojn. La defcito estas je daŭra ŝarĝo de la ŝtato.

KONFITEJO "LA CIKONIO"

G. DENDOOVEN-DERIJCKE

LANGESTRAAT, 52, BRUGGE . TEL. 342.78

specialaĵo de bapto-sukero
luksaj kaj ordinaraĵoj skatoloj

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

- W. Van Nereaux-Ameryckx, Overdekte Markt, 22-24, Van Wesenbekestr. — Viandisto. Tel. 33.75.38
Hugo Jacques, Lange Beeldekensstraat, 25. Presaĵoj Tel. 32.62.86
„Schoenen BED” (S-ino E. Bed), Lge. Gasthuisstr. 6. Suoj Tel. 30.07.28
V. Lieberman, Belgielei, 1. Juveloj, arĝentaĵoj
G. Faes, Schoenmarkt, 16. Ĉiuj muzikaĵoj, instrumentoj, radio kaj gramofono Tel. 32.67.21
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. De Soete-Vanistendael, Dambruggestraat 234, Okulvitroj — Rab. 5 %
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68. Apotekejo Tel. 35.40.67
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken
Vitraj — Speguloj. Tel. 37.88.20
J. Van Nereaux, Sterstraat 1. Viandisto Tel. 39.55.81
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Inĝen. : Neonlumo, Reklamoj. Tel. 81.48.47
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Pr. Leopoldstraat 157, Borgerhout. Peltaĵoj
A. van den Neste, Deurnebaas 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59
„In 't Duifken” (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64 : Kostumoj (5 % rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestr. 58-60 : Kuirejlaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, K., Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj — Rab. 5-10 % p.l. membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg
ŝuoj — Teksajoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25. Privataj lecionoj pri lingvoj, ankaŭ pri Esperanto.
Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Lange Beeldekensstr. 31. Gramofonaj diskoj por
meminstruado. Tel. 33.75.38
J. Van Hoof, Marialei 7. Pentraj-entreprenoj Tel. 39.35.33

Brugo

- Marcel Poupeye, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando Tel. 371.93
Charcuterie Strovi, Vlamingsstraat 38 (Teatroplaco). Viandvaroj. Tel. 334.08
Maison Joye, Geldmuntstraat 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, Spinolarei 19 : Konstrumaterialoj. Speciale naturŝtono de Jura.
Tel. 321.85
Pan- kaj Kukbakisto R. Rosseel, Mariastraat 30. Konsumsalono. Tel. 338.34

Bruselo

- M. Jirousek, 104 rue du Téléphone; reklamoj kaj litertipoj Tel. 18.77.67
Farmaciisto Jacobs, 94 rue général Eenens Bruxelles 3. Tel. 15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise. Tel. 59.13.73
„Bonbons Swinne”, 77 rue de Nieuwenhove. Tel. 44.57.36
Imprimerie Lielens, 18, rue de la Princesse. Tel. 21.10.98
Carrelages „Carrat”, 19 avenue de Saxe. Tel. 21.74.49
Viajn Meblojn ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57. Tel. 15.96.97
Tinkturejo, senmakuligejo „TEX”, 11 Av. du Couronnement, Woluwe St. Lambert
Tel. 70.75.82
KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en
siaj butikoj
G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Frizitoj por sinjoroj. Tel. 39.22.81
„De Boerinnkens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.
A. Roels, Montignystraat 155. Ledaj artikoloj-Seliso. Tel. 37.14.07
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36 : luo, aĉeto. vendo de libroj.
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Hopland 5 : privataj kaj grupvojaĝoj.

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj



Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj
manufakturaĵo firmo DE BROUWERE
Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (156) 216 54



Reprezentanto en Nederlando :
J. C. den hartog, kostverlorenstraat, 91
zandvoort, tel. k 2507/2008